

Iniciato NABOUBA por helpi orfojn kaj infanojn en malfacila situacio

Ĝenerale ni en Eŭropo konscias pri malfacilaj vivkondiĉoj de homoj en Afriko kaj certe multaj el ni estas tuŝitaj de bildoj en televido kaj gazetaro. Tamen, persona sperto estas multe pli forta, kiel mi mem spertis dum la ILEI-konferenco en Benino en 2008 kaj ĉefe dum la kelksemajna sekva vojaĝo tra Benino kaj Togolando.

Dum mia postkonferenca vojaĝo mi proksime al Lokossa (Benino) vizitis orfejon NABOUBA, en kiu krom alia estas instruata Esperanto. Mi restis en la orfejo unu tutan tagon kaj instruis tie Esperanton al la plej malgrandaj infanoj.



La vivsituacio de tiuj infanoj estas tre malfacila. En 2008 ili eĉ ne havis sufiĉe por manĝi, necesis havigi vestaĵojn kaj iel pagi lerneajn elspezojn kaj foje kuraci malsanojn. Tuj post la konferenco do ekestis ideo pri projekto, kies eŭropa kunordigantino mi nun estas, por trovi subtenantojn de tiuj infanoj, kiuj – se eblas – regule pagus monon por helpi al konkretaj infanoj kaj/aŭ la tuta orfejo. Laŭ la direktoro de la orfejo, kun kiu ni regule (do – oftege) estas en kontakto kaj kiu estas ege fidinda kaj plendediĉita homo, necesas helpi al infanoj, kiuj perdis ambaŭ gepatrojn, kaj poste aliajn, kiuj havas ankoraŭ unu de la gepatroj, aŭ eĉ ambaŭ gepatrojn, kiuj ne kapablas zorgi pri siaj infanoj pro malsano aŭ ne sufiĉaj rimedoj. Se la infanoj povus havi decan edukadon, ili pli bone povus prizorgi sin mem post la forlaso de la orfejo. Kaj imagu, se ni iom post iom sukcesus trovi subtenantojn por ĉiu infano!

Ni proponas pagi 15 eŭrojn po infano kaj monato – por ŝpari sendokostojn oni pagas por duona jaro, kaj eblas sendi monon al mia konto en Belgio, el kiu mi ĝiras ĉion kune al la konto de la orfejo, kiu estas registrita neregistara organizo. Mi mem transprenas ĉiujn sendokostojn. Novaj donacantoj povas aliĝi ĉiun duonan jaron. Nenio estas deprenata por la servo, kaj poste – ankaŭ senpage – loka kunlaboranto aŭ mi mem kontrolas elspezojn kaj raportas pri ili. Ĉiu havas skriban interkonsenton kun la infano pere de la orfejo. La ĉefa ideo estas, ke ĉiu persono, kiu partoprenas tiun projekton, pagu ĝis la infano forlasos la orfejon, sed se iu pro iu kialo ne plu povus/volus pagi, ni klopodos trovi anstataŭanton.

Mi esperas, ke pere de tiu ĉi artikolo mi sukcesos vekti intereson de pluraj eblaj donacantoj. Se iu el vi, legantoj, interesiĝas pri tiu ĉi subteno de la infanoj el la orfejo NABOUBA, bonvolu nepre kontakti min.

Mi konscias, ke pluraj homoj jam subtenas infanojn pere de aliaj projektoj kaj programoj. Sed dum la malmultaj monatoj, dum kiuj mi ekkolektis nomojn, mi ankaŭ komprenis, ke multaj ŝatus helpi, sed ne ŝatas sendi monon al grandegaj organizoj, kie multe da mono estas elspezataj pro administrado aŭ kie ne eblas bone kontroli la elspezojn. Nia iniciato estas eta, sed ĝi havas grandan sencon kaj estas ege konkreta. Ni ne povas savi la tutan mondon, sed ĉiu sablero multe valoras. En nia projekto nek unu eŭro estos perdita survoje al la infanoj, ĉar ĉiuj laboros tute senpage.

Kaj fine, eĉ se vi mem ne povas/volas subteni nian iniciaton finance, ĉiam bonvenigas informado – ĉu en Esperantujo, ĉu ekstere.

Kontakto:

Vlad'ka Chvátalová

Tomberg 26

1200 Bruselo, Belgio

sciuro@seznam.cz

